11-a JARO, N-o 431 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. JULIO 1935

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533 Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT. bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

AGAD-RAPORTARO DE LA PLENUM-KOMITATO (1934-35)

b) RAPORTO DE LA REDAKCIO

La redaktado de la gazetoj troviĝis, laŭ la teknika flanko, kiel en la antaŭaj jaroj, en la manoj de K-do *Bartelmes*. Ĉi tiu K-do prizorgis la lingvan k stilan flankon de la manuskriptoj, rekopiis ilin plejparte por la presejo post korektado k kompilis la enhavon de ĉiu numero. Kio rilatas la enhavon, la sama K-do transprenis ankaŭ la plenan respondecon pri la Literatura parto de « Sennacieca Revuo », same kiel pri la enhavo de « La Lernanto » k la malmultaj felietonoj k belliteraturaĵoj en « Sennaciulo ». Kio koncernas la ceteran enhavon de la gazetoj, nome la socipolitikan parton de «Senn. Revuo », la politikan k movadan parton de « Sennaciulo », pri ĝi portas la respondecon la Plenum-Komitato, kiu en la persono de sia prezidanto, K-do *Ĝermen*, prikonsideris la valoron de la artikoloj antaŭ la transdono por prilaboro al la redaktoro. Antaŭ la malakcepto de manuskripto K-do Ĝermen interkonsentis almenaŭ kun unu membro de la P.-K. pri tiu rifuzo, k en dubaj kazoj aŭ se interkonsento pri la akcepto aŭ malakcepto ne ekzistis ĉe du K-doj el la P.-K., la koncerna manuskripto estis prezentata al la P.-K. en ĝia regula kunsido. Ĝia decido fiksis la sorton definitivan de la koncerna manuskripto. Ĉiuj artikoloj, kiuj aperis je la nomo de la Komitato, estis kompreneble antaŭe legataj de ĉiuj anoj de la P.-K. k ankaŭ pridiskutataj en la kunsidoj.

Sennaciulo, kiel oficiala organo de la Asocio, devas esti k estis tribuno malfermata por ĉiuj anoj, kun la nura limigo, kiu estas difinita en la unua paragrafo de la Statuto (komprenemo k toleremo rilate al la politikaj k filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj k sindikatmovadoj. Konsekvence, ekzemple, la *frakcioj* el SAT-anoj, havantaj la rajton publikigi komunikojn en la oficiala organo, same kiel la *sekcioj* (fakoj), devus limigi siajn tekstojn al nuraj organizaj sciigoj. Tio ne okazis en la unua postkongresa komuniko de la *Sennaciista Frakcio*, kies teksto okupis sin tro detale pri la Sovetia problemo, pri kiu la anoj de tiu Frakcio havas sian specialan opinion abisme kontraŭan al tiu de anoj el iuj aliaj tendencoj. Kelkaj K-doj sekve protestis kontraŭ la en tiu raporto esprimita opinio k respondis ; post kio sekvis siavice respondo de K-do Lanti por la sennaciistoj. Kaj la diskuto pri tiu diference prijuĝata problemo verŝajne ankoraŭ daŭrus, se la P.-K. ne estus decidinta ĉesigi la debaton.

Sed cetere la enhavo de « Sennaciulo » ne trovis seriozajn malfavorajn kritikojn. Nur du raportoj pri aktualaj politikaj okazaĵoj (unu el Nederlando, la alia el Britio) sekvigis proteston pro parte neobjektiva prezentmaniero. Sed pri tio kompreneble oni ne povas respondecigi la redakcion, ĉar la redaktoro ja ne povas scii, ĉu ĉio estas objektive prezentita en raportoj transsenditaj el foraj regionoj. La redakcio ne ankoraŭ posedas televizi-aparaton, per kiu ĝi povus kontroli per propraj okuloj la laŭfaktecon de la raportoj liverataj. La objektiva verkado estas arto, kiu devas esti studata k elprovata k kiun nur malmultaj majstras, ankaŭ en niaj rondoj. Ĉiu verkanto havu sub siaj okuloj la unuan statut-paragrafon, antaŭ ol li komencas ĵeti siajn ideojn sur la paperon.

Ni aŭdis, ke en Nederlando, ekzemple, ne ĉiuj abonantoj jam povas tralegi *ĝue* la gazeton pro nesufiĉa lingvoscio. Sed tio estas tute komprenebla k ne povas esti riproĉo por nia redaktmaniero. Ja, eĉ se la novuloj k perfektiĝantoj ne ankoraŭ povas elĉerpi la *tutan* legaĵon al ili prezentatan, ili tamen povas legi kelkajn partojn, ĉerpante tie k tie por ili kompreneblajn tekstojn, k ĝuste tiel obstine k persiste legadante ili sukcesos fine tralegi la tuton, aŭ almenaŭ tion, kio ŝajnas al ili leginda. Ĝuste pro tio la redakcio atentas, ke ĉio estu prezentita laŭeble en formo de mallongaj artikoloj, notoj ktp. Restas tamen la tasko de ĉiu unuopa K-do ĝisfunde ellerni nian lingvon. Kaj almenaŭ ĉiu kunlaboranto al la gazetoj devas nepre posedi la « Plena Vortaro » n. Same kiel « La Lernanto », ankaŭ « S-ulo » k eĉ « S. R. » povus servi kiel *komuna* legaĵo ĉe kursoj de progresintoj, por kutimigi la novulojn al la legado de niaj gazetoj. K-do *Bas Vels*, nia nuna ĉefperanto en Nederlando, ankaŭ aludis tiun problemon, sed konkludas jene : « ... en la diskutoj (nome ĉe la Groningena Federacia Kongreso — *Red.*) *montriĝis bone, ke oni ŝatas « Sennaciulon* ». »

Multajn similajn laŭdajn juĝojn ni ricevis k parte publikigis ankaŭ en « S-ulo ».

Per la ĉefartikoloj ni provis klarigi plej ofte la ŝvebantajn problemojn, kiuj atendas solvon aŭ pri kiuj regas neklara opinio ĉe la K-daro. Temis pri laborista esperantismo, pri la organizado, pri la reunuigo de la movado, k.s. La regulaj konstantaj rubrikoj kiel *El nia Leterujo*, *Tra la Esperanta Gazetaro*, *Kroniko*, k.a. ankaŭ donis sian stampon al « Sennaciulo » kiel organo de la movado. Ni limigis niajn polemikojn kontraŭ alitendencajn lab. esp. gazetojn nur je refuto de la plej krudaj mensogoj aŭ kalumnioj kontraŭ nia Asocio.

El la regulaj rubriketoj ni devis forlasi la « Radio-rubrikon » pro tio ke la sekretario de la Internacia Radio-servo (prizorgata el Germanio), klarigis, ke li ne plu povas havigi al ni la materialon el tie.

Tamen ni enpresigas radio-informojn plue, kiam ni ilin okaze ricevas (ekz. pri la stacioj en Minsk k en Hilversum).

La Lernanto estis organa parto de « Sennaciulo » ; tiun aranĝon postulas la reduktita krizo-buĝeto, kiu ne permesas pligrandigi nuntempe nian oficialan organon. La problemo pri la kunlaborado al « L. L. » restis la sama kiel antaŭe, t.e. ni havas tro malmulte da regulaj k kompetentaj kunlaborantoj, ekzemple por la *Infanrubriko*, la *Distra rubriko*, Humoro, ktp. La redaktoro preskaŭ ĉiam devas mem kompili tiujn rubrikojn, mem elpensi k cerbumi, nehelpate de la K-doj. Eĉ la « Lingvajn Notojn » (kun unufoja escepto) ni devis mem prizorgi. Tiurilate ni volas atentigi, ke en la lingva rubriko ni ĉiam volonte donas respondojn al prilingvaj demandoj el la Legantaro.

Ĉu la lingvaĵo de « L. L. » povas esti pli facila, pli simpla ? tion oni jam plurfoje demandis nin. Ŝajnas al ni malfacile trovi vojon por multe plisimpligi la enhavon de « L. L. ». La legantoj devas kompreni, ke tiu SAT-gazeto ja ne ekskluzive servas al la interesoj de la komencantoj aŭ de la infanoj, sed ke ankaŭ la jam spertaj esperantistoj volas trovi en ĝi sian distran k instruan parton. Ĝi do laŭ nia opinio ne aspektu tro infaneca (kio ne malhelpas sufiĉe larĝan pliampleksigon de la porinfana rubriko en okazo de vigla kunlaborado !). Se ĝi estus nure porinfana k por-komencanta, ĝi perdus nepre sian distran valoron por la aliaj kategorioj da legantoj. Kaj ni opinias, ke en la *mallongo* de la unuopaj rakontetoj jam kuŝas instigo, kuraĝigo por la lernantoj. Ĉi lastaj, helpe de siaj instruantoj, devus mem prilabori por sia profito la prezentitan materialon ; ili devus ekz. analizi laŭ-sintakse k laŭ-gramatike la unuopajn frazojn de anekdoto, eĉ kopii ĝin por sin ekzerci, transformante la frazojn, disigante ilin, unuvorte prilaborante la temon laŭ nova strukturo. Certe tio eblas, k ni ne dubas, ke tia laboro eĉ jam okazas en iuj rondoj.

Ni ricevis kelkajn protestojn okaze de la aperigo de iuj humoraĵoj (en la marta n-ro), juĝataj kiel maldecaj. Ni el tio tiris la konkludon, ke tiaj maldelikataj spritaĵoj ne taŭgas por niaj gazetoj, k ni zorgos, ke simila materialo ne plu aperu.

Sennacieca Revuo, ĉiumonata dekses-paĝa socipolitika k literatur-scienca revuo, prezentiĝis ankaŭ ĉijare en la sama, preskaŭ oni rajtus diri — luksa aspekto, kun multaj ilustroj k kun tre riĉa k varia enhavo. Informartikolaro kun soci-politika, kun ekonomi-politika enhavo, diskutejo, dokumentigaj priskriboj, k larĝa literatura, arta k scienca parto plenigis la kajerojn. Ke ni povis daŭre aperigi tian organon, tio jam estas neneigebla sukceso. Oni devas kompreni, ke ĝuste *per la aperigo de « S. R. » ni esence daŭrigas la plenumadon de la kultur-klerigaj taskoj, por kies plenumo propradire estas kreita SAT*. La abonantoj al « S. R. » — bedaŭrinde ne tiom multaj, kiom meritus havi tia Revuo — certe konsentos senescepte k senhezite asigni al ĝi tiun gravan rolon en la SAT-laboro, k kredeble neniu el ili preterlasos okazon por ĝin varme rekomendi al aliaj K-doj (kiuj lastaj, certe, nur pro ekonomiaj kaŭzoj ne abonadas ĝin).

Menciinde, rilate la enhavon, ke la interesa verko de d-ro Totis pri « Seksaj problemoj de la Junularo » (entute 19 leteroj) en oktobro estos finpresita k tiel estos komplete aperinta en la kadro de « S. R. ». Menciinde ankaŭ, ke ni akiris pere de K-do Thorsen specialan intervjuon por « S. R. » de la konata dana proletverkisto M. Andersen-Neksö (aperintan en la decembra kajero). El multaj regionoj de la terglobo (ne nur eŭropaj) ni ricevis originalajn raportojn de niaj kunlaborantoj. Ĝenerale la kunlaborado en la kuranta jaro fariĝis pli kontentiga, kvankam mankoj rilate la sistemecon ankoraŭ restas.

Riproĉantoj rilate artikolon pri la « Ruĝa armeo » trovis okazon eldiri sian starpunkton en la rubriko « Diskutejo ». Same oni diskutis, laŭ sia tendenco, ĉirkaŭ la Milit-problemo. La evitado de l'disputpunktoj intertendencaj en la prezentado de l'raportoj k problemoj restas kompreneble daŭre sufiĉe malfacila afero.

Fine ni rimarkigas, ke dank'al aperigo de *Enhavotabelo* ĉe la fino de Jarkolekto (en septembro por « S-ulo », en februaro por « S. R. ») al la legantoj estas faciligite retrovi la aperintajn artikolojn k literaturaĵojn.

c) ADMINISTRACIO

ADMINISTRACIO K SPEZOJ

Fine ni sukcesis forigi la malordon, kiu regis en la kontoj post la migro de la Administracio de Leipzig al Paris. Estis kompreneble, ke dum longaj monatoj tiu ĥaoso kaŭzis al ni multe da malagrablaĵoj k surprizoj en niaj rilatoj kun la klientoj. Ofte mankis al ni la koncernaj detalaj dokumentoj, ĉar multaj korespondaĵoj devis esti detruitaj en Leipzig dum la politika krizo.

Al tiuj ĉi malfacilaĵoj sekvis la neceso translokigi la Administrejon al pli konvena k pli granda loko. La translokigo komence de majo 1934 kostis pli ol ni buĝetis.

La konstanta barakto kun kelkaj nepagemaj debitoroj, al kiuj ni plenfide liveris varojn, ne nur kaŭzas pliajn elspezojn por afranko de admonoj, sed ankaŭ postulas multe da tempo por longaj leteroj ripetitaj. La spertoj tiurilataj devigas nin al plej rigora sinteno rilate al kreditaj liveroj. Ni estis indulgemaj kun tiuj K-doj, kiuj petis limtempon por pagi, sed la plej multaj el la pendantaj ŝuldoj fariĝis tute dubaj pro nerespondo de la debitoroj. Eble en oportuna momento ni konigos al la esperantistaro la nomojn de tiuj, kiuj intence trompis nin, por ke aliaj ne same estu viktimoj de tiaj sentaŭguloj.

Malgraŭ rigora, ĝisekstrema limigo de niaj elspezoj, ni ne plu sukcesis redukti diversajn objektojn de niaj elspezoj. La ampleksa laboro ne permesis redukti la salajrojn, inter kiuj servas monate 1.057.75 fr. por redakcia k 500 fr. por administracia laboroj.

LIBRO-VENDO

La librostoko, en kiu troviĝas investita sufiĉe konsiderinda kapitalo, nur tre malrapide disvendiĝas. Por akceli la debiton ni konsentis al la franca, sveda k nederlanda LEA-oj eksterordinaran rabaton de 50 %, tiel ebligante al ili cedi siaflanke rabaton al la grupoj. Konsiderante la grandan nombron da novaj esperantistoj, oni devas konfesi, ke nur tre malgranda estas la nombro de tiuj, kiuj serioze alcelas la plenan posedon de la lingvoscio, akirebla nur per intensa studado de literaturo. El libroj, eldonitaj jam antaŭ dek jaroj en kvanto da 2.000 ekzempleroj, ankoraŭ nun restas stoko de 4 aŭ 500 ekzempleroj. Estas vere, ke ĉefe temas pri scienc-karakteraj libroj kiel « La Kemio de l'Universo » aŭ « La Vojo al Scienco de Estonto ». Tre malbone vendiĝas ankaŭ poemoj, kiel « Prologo » (vendo 48 ekz.[1]) k « Poemo de l' Plugisto » (10 !). Libroj plej bone vendeblaj estas ĉiuj, kiuj rilatas al la lingvo aŭ movado, kiel ekzemple « Petro » (vendo 794 ekz.[1]), « Unua Legolibro » (429), « For la Neŭtralismon » (147), « La Laborista Esperantismo » (90).

[1] La ciferoj rilatas la vendon dum la raportjaro 1934-35.

La intereso por « Komentoj al Komunista Manifesto » (13), « ILI » (11), estas preskaŭ nula. La vendokvanto de la ceteraj libroj varias inter 30 k 90 ekzempleroj.

Estas aparte notinde, ke laŭ informoj ricevitaj nur dum la pasinta jaro, ni perdis en Leipzig sufiĉe grandan nombron da libroj per detruo : 335 ekz. de « El la Mondbildo de l'Nova Fiziko », 95 ekz. « Malgranda Terbiblio », 3.636 ekz. de « Laborkajeroj », 148.000 ekz. de ilustr. poŝtkartoj k 4.379 ekz. de diversaj eldonoj de la « Internacia Socia Revuo ». La valoron de la perdo oni povas ciferi proksimume per 14.000 fr. fr.

La vendado de libroj el fremdaj eldonejoj restas en modestaj limoj.

AKCIBILETOJ

Depost la jaro 1932 ni ne plu vendis akciojn. Ekde 1.7.32 ni malaltigis la interezon, antaŭe fiksitan je 10 %, al 6 %, ĉar la ekonomiaj cirkonstancoj ne plu pravigis tian altan interezon. Intertempe la ĝenerala ĥaosiĝo en la internaciaj valutoj ankaŭ frapis nian akcikapitalon, ĉar la sumoj estas kalkulataj en dolaro, kiu perdis proksimume trionon de sia valoro. Sekve ankaŭ la valoro de la akcibiletoj reduktiĝas ĝis la nivelo de la usona dolaro.

Kelkflanke ni aŭdis, ke SAT devus kontinui reakcepti la biletojn laŭ ora dolaro. Sed tio estus metodo tute ne eltenebla de la Asocio. Ĉiu ŝparaĵo riskas hodiaŭ perdi la originan valoron k ĉiu administranto de ŝparaĵoj simple bankrotus, repagante ilin laŭ originala valoro. La akcibiletoj de SAT devigas SAT repagi *dolarojn*. Kiun kurzon la dolaro hodiaŭ havas, tio ne estas en rilato kun la pagdevoj de la Asocio.

La repago en kontanta mono de la akcikapitalo kompreneble hodiaŭ ne plu estas ebla. Sed ni ĉiam akceptas akciojn por pago de kotizoj k aĉeto de SAT-libroj (escepte de Plena Vortaro, kies kaso estas aŭtonoma).

PLENA VORTARO

(Raporto de K-doj Lanti-Banmer)

Ni jam diris, ke la financoj de la 2-a eldono de la P. V. estas absolute aŭtonomaj rilate la SAT-kason. Ni ripetas, ke en tio SAT ne riskas eĉ unu frankon, sed tamen tiros iun tagon el tio gravegan profiton. Nome kiam tute estos pagitaj la presisto, la bindisto, la aŭtoroj, la pruntintoj (K-do Lanti k K-do Banmer) ktp, tiam la cetero de la varoj apartenos al SAT. Kaj ne malproksima estas tiu tago.

Ĝis la 1-a de junio 1935, do malpli ol unu jaro post apero, el la 5.000 ekzempleroj ni dissendis, en ronda cifero, 3.000 ekzemplerojn. Sed necesas tuj aldoni, ke el inter tiuj 3.000 ekz. multaj ne estas fakte venditaj ; ili kuŝas ĉe niaj agentoj, aparte ĉe unu el niaj ekskluzivaj agentoj, nome la Federacio de Lab. Esperantistoj en Amsterdamo.

Post plua enspezo de la prezo el 500 ekzempleroj, la produkto de la vendo venos rekte en la kason de SAT. Pripensu, ke ĉiu ekzemplero reprezentos por SAT minimume 40 fr. fr., eĉ pli, ĉar multajn ekz. ni vendos sen rabato, aŭ kun escepta rabato por SAT-anoj.

Kompreneble tiu eksterordinara enspezo devos servi *unue* al likvido de malnovaj ŝuldoj, antaŭ ĉio al la K-doj, kiuj dum la danĝeraj tagoj de la skismo kuraĝe alportis sian ŝparitan monon por ŝtopi la breĉon. El tiu enspezo ni devos ankaŭ rezervi flanke parteton kiel kapitalon necesan por la tria eldono.

La egan valoron k utilon de tiu verko pruvas la sola fakto, ke spite la malfaciloj de la cirkonstancoj, spite la baroj, kiuj ĝenas, se ne fermas, la internacian trafikon k negocon, spite la izoligo, por ni, de la merkatoj sovetia, germania, aŭstria ktp., spite ĉio, nia Vortaro tamen vendiĝas ! Oni povas aserti, ke el inter la gravaj, imponaj verkoj, kiuj aperis depost 15 jaroj, ne unu sola sukcesis kiel nia *Plena Vortaro*. Sed estas vere ankaŭ, ke nia Vortaro forigis mankon, kiun de tre longe sentis bedaŭre la praktikantoj, la faktaj esperantistoj.

Ni ĝojas deklari ĉi tie, ke en la 2-a eldono de la P. V., SAT trovis savilon. Kaj la morala efiko estas ne malpli konsiderinda ! Certe la grandskala reklamo en la esperanto-gazetoj, la 3.000 ekz. jam dissenditaj, la 55.000 prospektoj dissemitaj, estas oblikva, sed tamen pozitiva propagando por SAT mem.

Tiuokaze ni menciu, ke la nova Direktoro de UEA ne estas al nia afero simpatia kiel lia antaŭulo. Ni proponis ree dissendi per la UEA-gazeto nian prospekton, sed S-ro Kreuz serĉis, k trovis, diversajn motivojn por prokrasti k fine por ne konsenti al nia propono. Estas vere, ke li ŝirmas sin malantaŭ la instrukcioj de la pli larĝa estraro de UEA. Li akceptis nur reklami en la kolonoj de sia gazeto k sub nomo de UEA, sed rifuzis ŝovi nian prospekton, multe pli trafan, sub la okulojn de la UEA-delegitoj k membroj.

Por fini, ni danku ree al la tri Lab. Esperanto-Asocioj, kiuj ne ŝanceliĝis antaŭmendi, kontraŭ pago, tuta aŭ parta, grandan kvanton de P. V. Ni rimarkigu ĉi tie, ke la plej bonan rezulton atingis la Nederlanda Asocio. Ne tiom bone sukcesas la Francia k Svedia Asocioj ; verŝajne pro manko da metodo en la reklamo. Ni decidis helpi al ili, en la vendado de ilia kvanto, per disponigo senpaga de nia prospekto.

* * *

La Raporto de la Konflikt-Komisiono estos legata ĉe la Kongreso.

Rezulto de la Baloto pri Ĝenerala Konsilantaro (Kategorio A)

Estas elektitaj Ĝeneralaj Konsilantoj de SAT K-doj *E. Norman*, *A. F. Doneis* k *Celed. Santos* (por la 1-a, 18-a k 20-a horzonoj) per 133 voĉoj, K-doj *M. Roux*, *J. Ege* k *J. M. Kerr* (por la 0-a, 16-a k 17-a horzonoj) per 132 voĉoj, K-do *T. Veder* (por la 19-a horzono), per 127 voĉoj.

La laŭordan kontrolon de la voĉdoniloj konfirmas : *J. Ĝermen*, *N. Bartelmes*.

Malrapida poŝtservo ? Cenzuro ?
Aŭ alia kaŭzo ?

La SAT-Administracio sendis *registrite* kelkajn numerojn de la Asociaj organoj, la 16-an de junio 1934, al sovetia K-do. Ĉi tiu ricevis la sendaĵon nur la 4-an de majo 1935, do preskaŭ unu jaron pli malfrue. Kaj la livero okazis verŝajne nur dank' al plurfoja plendo ĉe la pariza poŝto, kiu malfermis enketon. Nur post la kvara admono respondis la Sovetia poŝto.

Ĉe la Landaj Esperanto-Asocioj

Dana Laborista Esperanto-Asocio.

Laŭ invito de la Laborista esp. klubo en Aarhus kolektiĝis la unuan pentekostan tagon en la Popoldomo ĉ. 40 reprezentantoj de lab. esp. asocioj el Aarhus, Hinnerup, Viby, Odense, Kopenhago k Hilleröd. La kunveno celis starigon de landa asocio de danaj lab. esp. kluboj. Post longa diskutado oni decidis, ke la landa asocio pro la specialaj cirkonstancoj en tiu ĉi lando havu socialdemokratan tendencon.

La nomo de la asocio estas Dana Lab. Esp. Asocio, k *ĝi akceptis la Gotenburgan Konvencion* inter SAT k LEA-oj. Kiel prezidanton oni elektis K-don instruiston Magnus Jacobsen, Aarhus. Kasisto estas Holger Hansen, Aabyhöj k sekretario S. Mortensen, Viby. Ceteraj estraranoj : H. P. Nielsen, Odense, Arne Jensen, Aarhus, A. Borris, Hinnerup k R. Jörgensen, Aabyhöj. Du revizoroj, tripersona redakcia komitato.

H. P. N.

XV-a KONGRESO DE SAT EN PARIZO

3.-7. aŭgusto 1935

Adreso: SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20

Sepa (lasta) Komuniko.

AKCEPTEJO. Ĉe la Kongresejo (Salle ADYAR, 4, Square Rapp, Paris VII), ekde la 3-a de aŭg. matene. Oni iru nepre tien k *ne* al la Sidejo de SAT (aven. Gambetta), ĉar ĉi lasta estos *fermita* dum la kongrestagoj ! Pri *administraj aferoj* oni povos paroli dum la kongreso al deĵoranto ĉe la *librejo*, kiu funkcios en la kongresejo.

MONŜANĜO. Ĉar sabate posttagmeze k dimanĉe la bankoj estas fermitaj, oni monŝanĝu ĉe la alveno en la stacidomo : tie troviĝas monŝanĝejoj (serĉu la giĉeton kun vorto CHANGE), kie oni ŝanĝos je la banka kurzo.

LOĜADO. Por eviti troajn veturelspezojn al la K-doj loĝontaj en moderprezaj hoteloj (k eĉ povontaj loĝi duaŭ triope kune en unu ĉambro), la Loĝeja komitato disponis ĉambrojn en la tuja proksimo de la Kongresejo. La tendumantoj starigos sian tendaron en *Suresnes*. Ĉiuj anoncos sin unue ĉe la Akceptejo.

SOMERLERNEJO. Pro la frua dato (23.7.) la partoprenontoj sin turnu al la Sidejo de SAT, anstataŭ iri al la Kongresejo ! Ankaŭ poste-alvenantoj ! Loko : *Suresnes*. Loĝado : laŭdezire en tendoj, aŭ en malkaraj hoteloj.

FAKA KUNVENO. Okaze de la Kongreso la Stenografa Instituto Tutmonda (S.I.T.) organizos fakan kunvenon. Por ne ĝeni la kongreslaboron, tiu kunveno okazos dimanĉon, 4an de aŭgusto, je la 9-a matene en la Sidejo de « Institut Sténographique de France », 24, rue Monge, Paris (V). (Metro-stacio : Cardinal-Lemoine.) Ni estus feliĉaj konatiĝi kun ĉiuj stenografoj, eĉ ne disĉiploj de Duployé (sistemo propagandata de S.I.T.). Interesatoj sin turnu al : K-do *A. G. Provost*, 27, rue Chanzy, *Paris XI*.

FAK- AU FRAKCI-ESTROJ rilatu tuj post sia alveno kun la sekretario de OKK (pere de la libristo en la akceptejo) por fiksi daton k lokon por la koncernaj kunvenoj.

LA FERVOJAJ RABATILOJ estas senditaj al ĉiuj sufiĉe frue aliĝintaj K-doj.

Al ĉiuj kongresontoj ni deziras *Koran bonvenon en Parizo* !

O. K. K.

4. listo de aliĝintoj.

97. K. Vigier, Valence d'Agen, Francio ; 98. Auberger, Val. d'Agen, Francio ; 99. R. Prudek, Cornillas, Francio ; 100. K-dino B. Stockman, Paris ; 101. E. Leroy, Paris ; 102-03. Gek-doj A. C. Nienther, Amsterdam ; 104. J. P. Rosseel, Hago ; 105. Coldefy, Aulnay-s.-Bois, Francio ; 106. K. Koster, Zaandyk, Nederl. ; 107. J. W. Prent, Amsterdam ; 108. K. Osterholm, Malmö, Svedio ; 109. Doek. Blanksma, Huizum, Nederl. ; 110. K-dino Gez. Edens, Huizum, Nederl. ; 111. A. J. Bienevelt, B.T.O.-sekcio, Delft ; 112-13. Gek-doj Wolve, Delft ; 114. G. Haberland, Delft ; 115. A. Hietbrink, Delft ; 116. H. G. Bout, Delft ; 117. H. L. v. Scheepen, Delft, Nederlando ; 118. Rob. Porter, Manchester, Britio ; 119. Betty Davies, Manchester ; 120. Hilda Dillon, Manchester ; 121-122. Gek-doj Acton, Salford, Britio ; 123. V. Doughty, Manchester ; 124-125. K-dinoj Bowden, Manchester ; 126. Dav. Greenberg, Manchester ; 127. A. C. Muller, Amsterdam ; 128. K dino J. Lierens, Amsterdam ; 129. N. C. Nelson, Dordrecht, Nederlando ; 130. K-dino Bosma, Amsterdam ; 131. L. Kosmis, Amsterdam ; 132. René Favard, Tours, Francio ; 133. Edm. Dazun, Montargis, Francio ; 134. C. v. d. Schulp, Dordrecht, Ned. ; 135. Mary Hamilton, Manchester, Britio ; 136-37. Gek-doj Blanksma, Huizum, Ned. ; 138. J. G. Baxter, Liverpool, Britio ; 139. Joh. Nielsen, Bergen, Norvegio ; 140. V. Planman, Amal, Svedio ; 141. Bertha Smit, Bussum, Nederl. ; 142. K. G. J. de Jong, Amsterdam ; 143-44. Gek-doj G. de Jong, Amsterdam ; 145-46. K-doj J. k J. Martinez, Solliès-Pont, Francio ; 147. R. Scott, Letchworth, Britio ; 148. J. v. d. Berge, Amsterdam ; 149. W. F. Kruit, Amsterdam ; 150. Lagard, Amsterdam ; 151. A. C. v. d. Griend, Amsterdam ; 152. Bergström, Horndal, Svedio ; 153. Rosen, Stockholm ; 154. K-dino Elba Molin, Stockholm ; 155. K-dino H. Tenggren, Stockholm ; 156. M. Stöckl, Innsbruck, Aŭstrio ; 157. Erna Harder, Hago, Nederl. ; 158. K-dino Rebers, Rotterdam ; 159. H. Pikaar, Rotterdam ; 160-61. Gek-doj Lanoux, Hyères, Francio ; 162. R. François, Villeneuve-Yonne, Francio ; 163. I. Karmazine, Paris ; 164-65. Gek-doj v. d. Heeg, Bussum, Ned. ; 166. Germaniano ; 167. S. Frantzen, Amsterdam ; 168. H. Beauson, Levallois, Francio ; 169. Lud. Lagrange, Nanterre, Francio ; 170. A. Bang, Kävlinge, Svedio ; 171. A. Nilsson, Finspong, Svedio ; 172. Ragnar Gustafsson, Teckomatorp, Svedio ; 173. E. Olsson, Landskrona, Svedio ; 174-75. Gek doj Vacl. Koc, Plzen, Ĉeĥoslov. ; 176. Marie Folkova, Plzen, Ĉeĥosl. ; 177. Frant. Folk, Plzen ; 178. J. Papeau, Saintes, Francio ; 179. A. Ronso, Barcelona ; 180. Ferd. Vila, Barcelona ; 181. E. Ford, Salford, Britio ; 182. Violet Ford, Salford ; 183-84. Gek-doj Vlug, Noord-Scharwoude, Nederl. ; 185. G. Gyllensten, Värnamo, Svedio ; 186. B. Sjögren, Atvidaberg, Svedio ; 187. G. Svensson, Värnamo, Svedio ; 188. H. Nordlöf, Stockholm ; 189-90. D. B. k S. Kaspers, Beverwijk, Nederl. ; 191. A. Prent, Beverwijk ; 192. A. L. F. Gigengack Jr., Beverwijk, Nederl. 193. K-dino Boelens, Amsterdam.

K-doj kiuj aliĝis post la 6-a de julio, ne plu trovis lokon en ĉi tiu listo.

POR ŜTOPI LA BREĈON

36. listo.

Bertha Ohlsson, Enskede (ADLEL-kredito)	fr.	22.—
Sulski, Luton (ADLEL-kredito) ...	»	11.50
Iu el ie » » ...	»	28.50
V. Haignère, Bulonjo	»	10.—
J. Lenormand, Vitry-Loiret	»	5.—
Ducret-Echablens	»	5.—
Fidela Germ. SAT-ano	»	20.—

Provizora Programo de la XV-a Kongreso

Sabato, 3-a de aŭgusto: Tago de la alveno. Akceptejo funkcios ĉe la Kongresejo (Salle ADYAR, 4, Square Rapp, *Paris VII*, proksime de Marskampo = Champ-de-Mars).

20.30 h. Interkonatiĝa Vespero ĉe la Kongresejo kun muzikaj k aliaj prezentoj.

Dimanĉo, 4-a de aŭgusto: 9.30 h. Kolektiĝo ĉe la Kongresejo por promenoj tra la urbo. Akcepto ĉe la Norda stacidomo de la holanda per-fervoja karavano.

12-a h. Komuna manĝo en tri restoracioj, proksimaj unu de la alia — el ili unu estas vegetara.

Post la komuna manĝo irado al la solena malfermo.

14.30 h. Solena Malfermo sub la aŭspicioj de la FEO (LEA), kun orkestra muziko, kantoj, salutparoladoj de esp-istaj k organizaj reprezentantoj, ktp. Teatraĵo : La Versaja Kaptito.

20. 30 h. Kolektiĝo ĉe la Kongresejo por vizito al la dimanĉnokta Parizo (Montmartro, kc).

Lundo, 5-a de aŭgusto: 9. 30-a horo Unua Laborkunsido de la Kongreso.

14.30 h. : Dua Laborkunsido.

Vespere fakkunsidoj laŭ aranĝo de la fakestroj.

Mardo, 6-a de aŭgusto: Tria k kvara (ferma) laborkunsidoj (horoj kiel por lundo).

Vespere frakciaj k fakaj kunsidoj laŭ aranĝo de la respondeculoj.

Merkredo, 7-a de aŭg.: Vizito al muzeoj k vidindaĵoj laŭvole. Ŝipetveturo sur la Sejno. Altlernejaj Lekcioj. — Eventualaj fakaj aŭ frakciaj kunsidoj laŭbezone. Fervojista manifestacio kun sindikata apogo (matene).

Ĵaŭdo, 8-a de aŭg.: Oficiala tuttaga ekskurso (veturo senpaga) al Versajlo (Versailles), kasteloj k parko.

Por amatoroj estos aranĝata ekskurso al Fontainebleau (arbarego k kastelo) en la sekvanta tago.

Pliaj detaloj en la « Program-Libro ».

Proponoj al la XV-a Kongreso

4.

SAT-rondo de Malmö proponas, ke SAT organizu industrian informservon laŭ jenaj gvidlinioj :

Por ĉiu lando, kie SAT havas aktivajn membrojn, funkciu informantoj, kiuj havigu la necesan materialon pri salajroj k vivkostoj de la ĉefaj fakoj

k industrioj en sia lando, k laŭ eblo el aliaj, kie ni ne havas membrojn. Centra informejo estu starigota, kie oni kolektas k statistikas la materialon.

Aldona klarigo: La porlandaj (aŭ regionaj) informantoj raportas minimume unu fojon jare, aŭ tiom ofte, kiom necesas, pri ŝanĝoj de la vivkondiĉoj por kompletigi la statistikon. Por ne troampleksigi la laboron, ni en la komenco koncentrigu nin pri la ĉef-industrioj, kiuj influas la mondmerkaton : Ferindustrio kun ercminejoj, teksindustrio, paper- k mason-industrio, lignaĵindustrio, karb-industrio, gren-industrio.

Informpetanto pagas mem la koston de la informpeto. SAT-rondoj aŭ membroj interesas la sindikatojn pri la informservo k peras informojn.

Kiel nomon de la informservo ni proponas : Industria Informservo de SAT.

Post kolekto k pretigo de la baz-materialo ni kredas, ke la aparato funkcios sen tro multa laboro. SAT ja celas praktike servi al la proletaro, do nia propono volas nur sistemigi tiun servadon.

Por la Malmö-a SAT-rondo: 13 132
(E. Norman).

5.

La Kongreso decidu enstatutigi sub « Organizado », punkto D *Fakaj Sekcioj*. Nuna punkto D fariĝos E k nuna E fariĝos F.

Motivigo: La Fakaj Sekcioj estas laŭ sia naturo destinitaj enkonduki esperanton plej efike en la lab. organizoj. Ili krome prezentas ideojn, kiuj estas komunaj al ĉiuj tendencoj k tiel akcelas, sur tiu ĉi speciala kampo, la kunlaboradon inter la partie grupigitaj laboristoj. La SAT-gvidantoj laŭeble kreu k vivtenu, per rimedoj konformaj al ilia povo, tiujn Sekciojn.

Plenum-Komitato.

6.

« Sennacieca Revuo » aperu sub la sama formato kiel la antaŭa « La Nova Epoko », por ebligi ĝin konservi, kolekti, bindi. La formato, kiu taŭgas por « S-ulo », ne taŭgas por literatura gazeto.

Menpentiano (16 292).

7.

La Plenum-Komitato proponas al vi akcepti la sekvantan

REGULARO
pri
la funkciado de la SAT-Frakcioj

1. SAT-Frakcio konsistas el SAT-anoj, adeptoj de sama politika partio aŭ tendenco.

2. La tasko de la Frakcioj, al kiuj SAT donas sian apogon, estas la propagando de esperanto ĉe la respektivaj partioj aŭ tendencoj. Ĉar tiu ĉi propagando okazas unuavice per elmontro de la praktika utilo de esperanto, la Frakcioj rajtas proponi al la Plenum-Komitato de SAT rimedojn, kiuj faciligas tiun ĉi propagandan laboron. Ĉiu Frakcio rajtas disponi por organizaj komunikoj pri spaco de maksimume 30 linioj en ĉiu normal-ampleksa n-o de la Asocia organo « Sennaciulo ». Krome propagande valoraj artikoloj, ĝeneral-interesaj, povas principe aperi, de tempo al tempo, en la oficiala organo ; tamen la P.-K. rezervas al si tiurilate la decidrajton pri aperigo, laŭ la disponebla spaco.

3. La Frakcioj ne havas la rajton interveni kiel tiaj en la funkciadon de SAT. Rilate la frakcianojn — membroj de SAT — validas la Statuto de SAT inkluzive la artikolon 8-an, kiu juĝas membrojn agantajn kontraŭ la interesojn de SAT.

4. La politika propagando inter SAT-anoj favore al la partioj de la Frakcioj povas okazi nur per vojoj k rimedoj ekster la kadro de SAT. Ĉiu tendence politika materialo, manifestoj k deklaroj de partioj aŭ tendencoj, liveritaj ĉu de individuoj, ĉu de Frakcioj, al la redakcio de la SAT-organoj, submetiĝas al la ĝeneralaj reguloj, laŭ kiuj la redakcio decidas pri la publikigo. Artikolo, kies karaktero estas politike tendenca, ne povas aperi sub nomo de Frakcio, sed nur sub tiu de individuo(j).

5. La Frakcioj devas deponi kopion de sia Regularo aŭ Statuto ĉe la P.K. de SAT k sendi ĉiujn siajn eldonaĵojn 2-ekzemplere al ĝi. La principoj de la Regularo aŭ Statuto ne rajtas devigi frakcianojn agi kontraŭ la Statuto de SAT.

6. Tiu ĉi Regularo validas nur dum unu jaro k devas esti konfirmata aŭ ŝanĝata, laŭ la spertoj pri ĝia funkciado, de ĉiu Kongreso de SAT.

La Frakcioj en SAT

Ĉi tiu temo en la lasta tempo ree aktualiĝis, k tiom longe, kiom ekzistas en nia Asocio frakcioj, tiom longe ĉi tiu problemo postulos nian plenan atenton.

Ĉu pro tio la frakcioj politikaj aŭ fakaj nepre estas nuligindaj ? Laŭ mi ne, sed la SAT-anaro agos saĝe, funde pristudante la laborterenon de la frakcioj k allasante al ili nur agadon ekster la vicoj de nia Asocio. Sed parte ĉe niaj membroj la kompreno pri allasebla k neallasebla agado de l'frakcioj ankoraŭ ne estas klara. Pri tio ekzemplon :

Antaŭ nelonge mi legis en « S-ulo » pri fondo de bolŝevist-leninista frakcio en SAT, por propagandi la politikon de tiuj partioj, kiuj emas fondi 4-an Internacion. Mi petis informojn al la fondintoj, ĉar la komuniko interesis min, k mi ricevis sufiĉe da informmaterialo pri la celado de la nova frakcio. Sed kun granda bedaŭro mi konstatis, ke tiuj K-doj, aspirante la realigon de unuecfronto laboristara, estis farintaj la unuan paŝon al la detruo de kamaradeca kunlaboro, kiu estas fakto en nia supertendenca asocio.

Ili ja postulas de siaj membroj propagandi la politikon de la 4-a Internacio en la vicoj de ĉiaj esporganizoj *ĉiamaniere* (ekz., oni devas membriĝi al tiuj organizoj, se necese, sub kaŝnomo). Mi avertis ilin, ke per tiaj agoj oni rikoltas nur detruon en organizoj, kiaj estas SAT k ke la plej akraj malagrablaĵoj ne povos forresti.

Kaj jen en posta cirkulero de tiu frakcio oni legas rilate al SAT : « En la lasta tempo ni spertis, ke la Plenumkomitato de SAT komencas saboti nian laboron (Bolenfrasat — *Nomo de la frakcio*). Ŝajne la lantiistaĉoj en Parizo pensas, ke ili povas kun ni same ludi kiel kun la kom. k antaŭa soc. frakcioj. Ili baldaŭ spertos, ke ili eraris ! »

Jen la rezulto de unuec-frontaj aspiroj, bazitaj sur la altrudo de partipolitiko en supertendenca movado. Unuflanke sabotado (prave aŭ ne), aliflanke insultoj. Kaj tiuj malagrablaĵoj estas kaŭzataj nur de miskompreno pri la taskoj, kiujn la frakcioj en SAT havas. La laboroj de la frakcioj k de la membroj kiel frakcianoj, kiaj ajn ili estas, povas troviĝi nur ekster la vicoj de SAT, ekster la vicoj de landaj organizoj, kiuj same estas superpartiaj. Se ni volas uzi esp. organizojn, en kiuj diverstendencanoj kunlaboras, por partipolitika propagando, tiam la kvereloj k skismoj ne povas ne veni. Ĉiu sincera k prudenta K-do komprenas tion.

Tamen tiuj frakcioj havas taskon — eble gravan. Kiel unua povas esti nomata la propagando por esperanto en propraj politikaj aŭ fakaj medioj, ĉar ni neniam forgesu, ke por unuigitaj esp-istoj esp-o estas la ĉefaĵo, dum por unuigitaj politik-partianoj la politiko estas la ĉefaĵo. Iuj espistoj ne bone sentas tion. Pro tio, ke apartaj K-doj ne sufiĉe fruktodone propagandas esp-on en siaj politikaj medioj, la frakcioj devas transpreni ĉi tiun taskon.

Krome la frakcioj certe rajtas eldoni legaĵojn kun politika aŭ filozofia tendenco, sed tiuj legaĵoj neniam aperu en la organoj de SAT. En ĉi tiuj aperu nur la verkaĵoj de apartaj membroj.

Se raportaj artikoletoj de la frakcioj en « S-ulo » estas plene raportaj, tiam danĝero ne minacas, sed oni facile transpasas la limon. La artikolo pri la Sennaciista kunsido en Valencio ne estis pure raporta, ĉar oni grandparte uzis la spacon por letero de K-do Lanti, kies enhavo estis ege tendenca. Ni esperu, ke tio estonte ne plu okazos.

Trie, la frakcioj trovas grandan laborterenon sur kampo de tutmonda korespondado de la membroj. Ni daŭre instigu la anojn al praktikado de la lingvo ! Se la frakcioj malatentas aktivigi la membrojn al uzado de la lingvo, se ili nur trumpetas pere de kelkaj ĉefoj, tiam ili certe maltrafas la celon.

Jen koncize mia kompreno pri frakcioj SAT-anaj, kiuj povas nur esti frakcioj ekster SAT, t.e. frakcioj el SAT-anoj, kiuj laboras ekster la kadro de nia organizo. Ĉu per tio ni volas elimini la politikon el SAT ? Ĉu ni volas flanke lasi la klasbatalon ? Milfoje ne ! Ni nur volas elimini el la

---

Ĉis la Skismo la SAT-principoj estis akceptataj de la skismigintoj kiel ĝustaj, bonaj k trafaj. Ili restis k restas tiaj...

politiko tion, kio nin disigis k senfortigis : la fanatika dogmema partiadorado. Ni nur volas flanke lasi el la klasbatalo la kruelan *interbatalon* de nia klaso ! Jen parto el nia SAT-tasko, el nia SAT-a idealismo, kiu eble iam montriĝos esti la plej alta idealismo. Dependas de nia kompreno, ĉu ni volas kunlabori al tiu tasko.

B. Wels.

Frakcia Vivo

Komuniko de Bolenfrasat

(Bolŝevist-leninista Frakcio de SAT)

Adresoj: Centra oficejo : BOLENFRASAT, pere de S.A.U., Danio, *Kopenhago,* F. Duevej 120 o.g. *Nederlando:* Bas Wels, *Rotterdam,* 1-ste Wandelloordwstr. 33. La adresojn de niaj landaj perantoj en Portugalio, Svisio ktp ni pro konspiraj kauzoj ne povas publikigi. Peranto por la skandinavaj landoj estas *T. Lau, Kopenhago,* Kjeldsgaardsvej 33.

Gazeto: La K-doj estas petataj havigi al ni kiel eble plej multajn abonantojn por nia teoria gazeto — la sola teoria marksisma gazeto en Esperantio — *La Permanenta*[1] *Revolucio.* La ponumera prezo estas 0,20 dan. kr. aŭ egalvaloro aŭ unu internacia respondkupono. Por ekz. aboni dek numerojn, oni sendu al ni 2 dan. kr.

La unua n-ro havas fundamentan karakteron k aperis sub la titolo *La Fundamentaj Principoj de la Kvara Internacio.* La dua n-ro aperinta fine de junio enhavas artikolojn pri la politika situacio en Ĉinio, pri soveta Cinio, Kuomintang ktp. La tria n-ro estos ĉ. 13-paga k enhavos la esp. tradukon de la programo de la Laborista partio en Usono.

Materialo: Jenaj artikoloj estas haveblaj pere de ni (oni sendu por la afranko unu resp. kup. aŭ 20 dan. oerojn, senlaboraj K-doj ricevos ĉion senkoste) : Dek-unu programtezoj de la bolŝevistoj-leninistoj ; Deklaro pri neceso k principoj de nova internacio. Mallonga deklaro... (la sama kiel alvoko). El deklaro de la bolŝevistoj-leninistoj. Programo de la lab. partio en Usono. Francio antaŭ la decido. Laborista registaro en Norvegio. Revolucia proletaro k la milito. Parolado pri la nova internacio. La kamparana milito en Ĉinio. Kial mi rompis kun la ĉinaj stalinistoj. La nova partio en Nederlando, ktp.

Atentu ! Kiu francia K-do povas sendi al ni raporton precizan pri la lasta SFIO-kongreso ? (Ni havas kelkajn nacilingvajn raportojn, sed deziras havi precizan, se eble de K-do, kiu partoprenis).

Por la CK de Bolenfrasat: K-do Oĉjo.

Mortofrapo al Esperanto en la Tria Regno

La fervora k humila submetiĝo de la germana burĝa esperanto-movado sub la jugon de la faŝista diktatoraro germana ne povis malhelpi, ke la kaporalo, nomita ministro por instruado, verdiktu mortkondamnon al la instruado de esp-o en la lernejoj. La regna k prusa ministro por edukado direktis al la lernejaj administracioj de la regnaj subŝtatoj jenan dekreton, sub dato de la 8. junio :

« La instruado de artefaritaj mondhelplingvoj kiel esperanto en nacisocialista ŝtato ne havas lokon. Ĝia uzado havas kiel rezulton malfortigi esencajn valorojn de nacia propreco. Estas tial necese eviti ĉiun akcelon de instruado en tiaj lingvoj. Lernejaj ĉambroj por tia celo ne plu estu disponataj. »

Kontraŭa dekreto el la jaro 1924, celanta la altajn k mezgradajn lernejojn estas samtempe nuligita.

Alia komplotulo de tiu ĉi kulturatencinto deklaris rilate al tiu ĉi dekreto, ke esp-o ĝuas antaŭ ĉio la simpation de la internacia marksismo k de la tutmonda judaro.

Ni ne estas surprizitaj pri tiu ĉi nova pruvo pri la ĝiskerne barbara karaktero de la hitleraj faŝistoj. Kun interna logiko tiu ĉi reĝimo devas nuligi iom post iom ĉiujn restaĵojn de civilizo, devas senfruktigi la fontojn de homa arto k neniigi la plej altajn k noblajn konkeraĵojn de la eŭropa kulturepoko. Tio, kio restas, estas stulta k mania adoro al fizika forto k fantaziado pri « esencaj valoroj de la nacia originaleco », kiun neniu plu scias difini.

La esperantistoj el la tuta mondo estu singardaj ! Esti esperantisto signifas batali por konservo de la homa kulturo. Esti esperantisto signifas tial batali kontraŭ la faŝismo.

J. G.

[1] Neologismo, kiu signifas : Kontinua, seninterrompa, daŭra, ada. — *Red.*

Al niaj membroj k klientoj en Jugoslavio !

Pro ĵusa dekreto, kiu baras la eksporton de kapitalo el Jugoslavio, ne oportunas, dum kelka tempo, ĝiri monon al nia poŝtkonto en Zagreb (n-o 41.448). Ni petas vin pagi kotizojn, mendojn ktp al konto n-o 33.563 de la firmo *A. Celap,* Trg Kralja Aleksandra 8, *Zagreb,* kiu okaze transpagos al ni. Ne forgesu mencii « por SAT-Paris » sur la kupono k samtempe informi nin poŝtkarte.

... kaj al la germaniaj

La eblo transpagi el Germanio per poŝtmandato estas tre limigita. Al tiuj, kiuj ne povas uzi tiun vojon, restas nur unu rimedo, t.e. respondkuponoj, — sed tiu procedo estas multekosta. Tial ni pretas fari esceptan kondiĉon al tiaj pagantoj pri la *Plena Vortaro,* nome : kontraŭ nur 30 respond-kuponoj, regule stampitaj, ni ekspedos rekomendite unu ekzempleron binditan.

En nia movado

(Kroniko)

Britio. En *Letchworth* (50 km norde de Londono) okazos ekde la 10-a de aŭgusto Kongreseto, en bela ĝardena tendaro kun sportejo, kiu estos senpaga por kelkaj alilandaj K-doj, kiuj plej baldaŭ anoncu sin ĉe la gastigonto, K-do *Russel Scott, Letchworth.* Kondiĉo : ili ne scipovu anglan lingvon (pro la propaganda valoro de ĉeesto de alilingvanoj, kiuj renkontos ĉi-landajn esp-istojn). La vojaĝo de Londono al Letchworth al tiuj K-doj ankaŭ estos pagata.

Hispanio. *Barcelono.* 4 membroj de A.O.M. reprezentos tiun gravan lab. kultursocieton ĉe la 15-a Kongreso. Ties Esperanto-fakultato funkcias depost unu jaro kun elementaj kursoj, kiujn partoprenis pli ol 50 p. k daŭriga kurso (laŭ metodo « Petro ») partoprenata regule de 18 lernantoj. La SAT-rondo de tiu ĉi grupo jam konsistas el 7 K-doj.

Nederlando. *Roterdamo.* La Sudaj sekcioj de R. malfermis sian propran domon en Ploegstr. 37. Estas la tria propra hejmo en Roterdamo. Ĝi povas enteni proks. 120 lernantojn sidantajn ĉe tabloj. (Gratulon sinceran ! *Red.*)

Radio-notoj

La Fed. de Lab. Esperantistoj regule prizorgas en kunlaboro kun VARA (lab. radioamatora) asocio) esp. elsendojn, ĉiu dekkvartage, sabate de 18.30 — 18.50 h (amstd. tempo). Aŭg. 3-an k 17-an (ne la 31-an !), Sept. 14-an k 28-an. Parte esp-lingve, parte holande propagandcele). *(Atentu ĉi-rubrikon en la venonta n-o !)*

Memornoto

Represis el « Senn. Revuo » : *Soelawesi,* Makassar, 11.5 (Kulturo de l'Nuntempo).

Priesper. artik. k notojn enhavis : *Skaraborgaren,* Falköping, 7.6., 12.6. ; *O Emancipador,* L. Marques, 27.5., 10.6. (kurso) ; *Het Museumskwartier,* Amsterdam ; 16.5. ; *Signalen,* Stokh., 6., 13., 20., 27.6. ; *Arbetaren,* Stokh., 13., 18.6. ; *Die Nieuwe Fakkel,* Amsterd., 25.6. ; *Smaalens Socialdem.,* 12.6. ; *La Voix libertaire,* Limoges, 29.6. ; *Le Temps,* Paris, 14.6. k multaj aliaj gravaj gazetoj raportis pri la malhelpo al esp-o en Germanio.

Korespondado

Francio

K-do *J. Papeau,* instruisto 67, rue Général-Sarrail, *Saintes,* dez. kor. kun eksterl. gekolegoj.

Nederlando

K-do *P. v. d. Plank,* Peranto en Dordrecht, transloĝiĝis al Josselin de Jongstr. 1 en *Dordrecht.*

Portugalio

Du lernantoj dez. kor. kun Gek-doj ĉl. pri ĉt. Resp. gar. Adr. : Manuel Fernandes, Calçada de Sant'Ana, 27 *Lisboa.*

En aŭgusto nia Sekcio inaŭguros sian " Propran Domon " ; okaze de tio ni volonte ricevos esp-aĵojn, let. ktp. por ke ni ilin povu ekspozi en la elmontrejoj k montri al la publiko, ke esp-istoj havas voĉon sonantan tra la tuta mondo ! Al ĉiu sendinto ni *nepre* skribos !

Adreso : *Kdo. B. Polder,* Alkm. str. weg 194 Wyk aan Duin, *Nederlando.*

Granda nombro de kurspartoprenintoj, ankaŭ *infanoj,* el Amsterdam (N) deziras praktiki esp-on per serioza koresp-ado. Komence de aŭgusto ni aranĝos koresp. vesperon k honeste resp. al ĉiu, kiu sendis let. aŭ bildkarton. Adr. : K-do *H. A .v. d. Horst,* Zuideinde 91 d'*Oostzaan,* Nederlando.

SENNACIECA REVUO

Legu en la julia kajero interalie:

Kia estas la Faŝismo de Musolini — Instruado en Polio — Strikoj, sindikata movado — Ĉu ni povas lerni de la klasmalamiko ? Ktp, kc. Ampleksa literatura k scienca parto. — Sub la Sagoj de la Kritiko.

Unuopa n-ro : 2.25 fr. Jarabono : 25.— fr. fr.

SAT, 67, *avenue Gambetta, Paris* 20.

Prez-malaltigo por likvidi stokon !

Ni liveras kun eksterordinara prezmalaltigo la verkon de Fruictier-Grenkamp :

Kompleta Gramatiko k Vortfarado

200 paĝoj. Formato : 15×22 cm. *Prezo:* 11.— fr. (afrankite), anstataŭ 25.— fr.

SAT, 67, *avenue Gambetta, Paris* 20e.